

**Rezultprotokolo de la 45-a senatkunsido, okazinta kiel 30-minuta „kunstaro“ sekve de la AIS-prezentado la 28-an de julio 2001 en la Elektroteknika Fakultato en Zagreb, kadre de la 86-a UK de UEA.**

Ĉeestis la senatanoj Frank, Maitzen, Minnaja kaj Wickström, estis deleginta sian voĉon al la prezidanto senatano Quednau. La invito estis anoncita dum la senatkunsido en Freising kaj okazinta retroŝte. Ne estis dubo pri la kvorumeco.

- 1 Konforme al la decido farita dum la antaŭa senatkunsido, la trezoristo konstatis, ke la kondiĉoj por la okazigo de SUS 24 en Bydgoszcz estas jam esence plenumitaj. La solena malfermo okazis dimanĉon 2001-09-23, je la 18-a h, la ferma solenaĵo jaŭdon la 27-an de septembro. La tri kandidatinoj el Rumanio, por kiuj la prezidanto transprenis de AIS Rumanio persone la kotizon la 2-an de aŭgusto, estis akceptataj.
- 2 SUS 25 okazis 2002-08-31/09-07 en Nitra. Oni malfermu la 2-an de septembro matene. La konferencan parton de la programo de la kibernetika sekcio organizu la kolektiva subtena membro TAKIS (prezidantino: AProf. Dr. habil. E. Poláková) kiel 16-an Internacian Kongreson pri Kibernetiko.

*Protokolis H. Frank*